


Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2023

Jarkolekto 10 - Numero 2



ENHAVOTABELO

de aprilo 2023

Titolpaĝo:	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	5
PĚTERIS KADIŖIS (1857-1923)	
UMEA 2a Konferenco en Veszprém 1987	
Jan Amos Komenský (1592-1670)	
13a Universala Kongreso de Esperanto 1921	
Spikumajoj & suplementoj: Pri la monumento en Francesbad (2).....	9
Por spuremuloj!	10
Valormarkoj & valorbiletoj:	11
Historiaj aspektoj: 9a SAT-kongreso Leipzig 1929	13
Aspektoj de numismatiko: Provaĵo por sovetia insigno de 1958	15
Terminaro: alfabeto listo (33)	16
Numismatika forumo: Ĉu kontanta mono ankoraŭ estas bezonata?	17
El la gazetaro:	19
Retpoŝto	21
Anoncoj & eventoj	34

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

*Mono odoron ne havas,
sian devenon ne diras.
Zamenhofa proverbo*

En la redakcia artikolo de la unua numero de jarkolekto dek ni emfazis la meritojn de multaj diverse aktivaj personoj, kiuj oportune aŭ regule kontribuis al la konkretigo de la ENA-revuo.



Hodiaŭ ni danke fokusas je germana esperantista aktivulo, kiu kiel propravola retejestro jam antaŭ multaj jaroj proponis krei retejon por nia asocio. Li nomiĝas **Frank Merla**, kaj liaj penoj kaj akurateco estas por ni nemalhaveblaj. Li ja ne nur ebligas al membroj, kiuj akcidente ne ricevis novan numeron aŭ same akcidente forviŝis ion, facile trovi ĝin pere de Google. Sed li ankaŭ ebligas al membroj kun gmail-adreso mem akiri novajn numerojn, kiuj bedaŭrinde ne povas esti faske sendataj de ENA. Oni do nur tajpu: <http://ena.frali.bplaced.net> kaj rezulte oni vidas “*Esperanto - Numismatika Asocio (ENA)*”. Sufiĉas sekve klaki sur la deziratan numeron, por (re)trovi kiun oni volas konsulti aŭ elŝuti. Dankon, Frank!

Post ĉi tiu rememoriga servocela informo, jen iom da klarigoj pri la enhavo de la nova numero, la dua de la jubilea jarkolekto.

Kroma menciinda, tamen ne-esperantista, meritulo estas la latva artisto-medalisto **Jānis Strupulis**. Dum la jaroj 1976 ĝis 1989 li kreis kelkcent diversspecajn medalojn kaj **ne malpli ol 21 diversajn Esperanto-medalojn!** En ĉi numero ni montras kaj priskribas la 20an el tiu rekorda kvanto. Fine de julio ni do kompletigos la mirindan kolektindaron.



Aliloke vi trovos diversajn artikolojn, i.a. pri la situacio de kontanta mono en diversaj kontinentoj. Ni provas respondi je la demando, ĉu kontanta mono malaperu aŭ ne!

Krome vi trovos, kiel kutime, la priskribon de kvar ne jam priskribitaj medaloj, kaj diversspecajn kontribuaĵojn en la aliaj konataj rubrikoj.

Ni deziras al vi ĉiuj agrablan perokulan promenadon kaj legadon tra la nova numero!

Bert


La esperanta trezoro de Strupulis: parto 1a



MONEROJ & MEDALOJ

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

PĒTERIS KADIĶIS (1857-1923)



Lando: Latvio

Metalo: bronzo

Diametro: 75 mm

Jaro: 1989

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: Jānis Strupulis

Diko: *serĉata*

Averso:

meze: busto de Kadiķis, iome dekstren

sube: “PĒTERIS KADIĶIS

1857 – 1923”

medalista signo: S₁, sen jarindiko

Rimarko 1:

Kadiķis estis latva profesoro pri matematiko.

Rimarko 2:

Esperantisto ekde 1892. Aŭtoro de “Lingvaj Studoj”.



Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

UMEA 2a Konferenco en Veszprém 1987



Lando: Hungario
Metalo: latuno (?)
Mezuroj: 85 mm x 80 mm
Jaro: 1987



Kvanto: *serĉata*
Pezo: 250 g
Medalisto: *serĉata*
Diko: 4 mm

Averso:

supre: "UMEA / II.KONFERENCO / VESZPRÉM / 1987"

supre-dekstre: parto de urba panorama (kun burgo Vár)

meze: + dekstren kaj maldekstren: abstrakte stiligita ornamaĵo

sube-dekstre: alia parto de la urbo kaj kelkaj domoj

Rimarko1:



burgo kaj domoj de Veszprém sur monteto

Rimarko2:

la konferenco (6a IMEK = Internacia Medicina Esperanto-Kongreso) estis organizita en 1987, en la 100a, jubilea jaro de la ekzisto de la Internacia Lingvo Esperanto. Partoprenis ĝin 150 medicinistoj el 17 landoj. Patronoj estis la urbestro de Krakovo (Pollando) kaj la rektoro de Medicina Akademio en Krakovo.

La redakcio elkore dankas Julinjon kaj Ludovikon Molnár pro la bildoj kaj la informoj.

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Jan Amos Komenský (1592-1670)



Lando: Nov-Zelando
Metalo: oro (.999,9)
Diametro: 65 mm
Jaro: 2011



Kvanto: 250
Pezo: 348,5 g
Medalisto: Michal Vitanovský
Diko: *serĉata*

Averso:

supre-ĉirkaŭe: “ELIZABETH II. NIUE ISLAND”

supre: busto de la brita reĝino, dekstren

meze: kronita majusklo E

sube-maldekstre: “250 DOLLARS 2011”

sube-dekstre: sidanta virino kiel alegorio de gramatiko, kun alfabeto tabuleto kaj anserplumo laŭ la temo de lia verko por infanoj “Orbis sensualium pictus”

sube-meze: simpligita skemo de rondforma planetario. Kronita CМ

Reverso:

ĉirkaŭe: “JOHANNES AMOS COMENIUS · PRAECEPTOR GENTIUM”

meze: ĉetable sidanta Komenio, skribante. Surtable globo. Sur pendanta tablotuko titolo de lia verko “DIDACTICA OPERA OMNIA”

tute-sube: medalista aŭ monfarejstra signo

Rimarko 1:

NIUE: koralinsulo en Pacifiko, nord-oriente de Nov-Zelando

Rimarko 2:

“praeceptor gentium” = instruisto de popoloj

Rimarko 3:

“didactica opera omnia” = kompletaj didaktikaj verkoj

Vidu ankaŭ jk.10, n-ro 1

Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

13a Universala Kongreso de Esperanto 1921



Lando: Ĉeĥoslovakio

Materialo: kartono

Diametro: 55 mm

Jaro: 1921

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 0,74 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 0,50 mm

Averso:

fono: blanka bildo: verda

ĉirkaŭe: bendo kun surskribo: “XIII.UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO”

meze: stiligita laŭrokrono kun ambaŭflanke foliareto/Esperanto-steleto kun litero E

sube: stiligitaj konturoj de la urbo Prago / dato de la evento: 31.VII.-6.VIII.

tute sube: banderoleto kun surskribo “PRAHA-1921.”, inter novartecaj arabesketoj

Rimarko 1:

supre: metala “okuleto” tra la kartonon. Tra la aperturon verda rubandeto

Rimarko 2:

PRAHA (=ĉeĥe): Prago

Rimarko 3:

Ĉeĥoslovakio: ekde 1918 ĝis 1992 ŝtata fuzio de Ĉeĥio kaj Slovakio

Rimarko 4:

la uzo de kartono anstataŭ metalo estis kaŭzita de la altaj inflacio kaj prezoj de metaloj post la unua mondmilito. Kartono estas tamen tre delikata substanco, ĉi-kaze tre bone konservita

Rimarko 5:

la bildo (avere) estis presita per verda inko

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Pri la monumento en Francesbad(2)

Medalo al centjariĝo de Esperanto

*“En la jaro 1987 festis esperantistoj de la tuta mondo la centjaran jubileon de Esperanto. Kompreneble, ke ankaŭ esperantistoj en Ĉeĥoslovakio intencis omaĝi la jubileon kaj tiucele akceptis la estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio specialan agadprogramon jam en la jaro 1985, kiu enhavis vicon da diversajeroj. Inter tiuj estis ankaŭ la eldono de jubilea medalo. Oni alparolis la eminentan ĉeĥan skulptiston **J. Harcuba**, kiu estis ankaŭ esperantisto kaj li la postulon akceptis. Lia arta propono estis sekve realigita en la jubilea jaro 1987.*



*Priskribo de la medalo: sur la averso estas portreto de la kreinto de Esperanto, parton de la kapo kovras la maldekstra flanko de kvinpinta stelo kun la litero E. Laŭrande estas surskribo **Dr. Lazar. Ludwig** – maldekstre kaj dekstre per pligrandaj literoj **Zamenhof**. Sube estas lokita la nomo de la skulptisto Harcuba. La dorsa flanko portas la simbolon de la jubilea jaro, kiun tiutempe uzadis UEA, kompletigita per E-stelo; sur la resta flanko-parto estas teksto **Esperanto / 1887 * 1987 / eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio**. Inter la jarindikoj estas malgranda steleto kun tiliaj folietoj (tilio estas ĉeĥa simbola arbo). La medalo havas diametron de 60 mm kaj estas farita el tombako; ĝin produktis ĉeĥa kooperativo por artproduktado Znak en Malá Skála en la nombro de 250 pecoj. La medalo estis vendebla. Laŭ mia opinio vere belaspekta artefakto, kiu bone reprezentas la kontribuon de la eldoninto al la jubileo, ne nur inter esperantistoj sed ankaŭ inter numismatoj.”*

Vlastimil Kočvara

Denove ni dankas Vlastimil pro la verkado de la dua, kompletiga, parto de lia artikolo.

Vidu ankaŭ en jarkolekto 4, numero 3, p.19-20 kaj jk.4, n-ro 4, p.13

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. Ĉu niaj (polaj kaj usonaj) samideanoj povas helpi nin?

XXa enigmo



XXIa enigmo

Usona
Esperantisto
Dumona bulteno de Esperanto-USA • Numero 2013:4 (jul-aŭg)

ISSN 1056-0287

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2013:4 (jul-aŭg)

Ĉi-numere:

- De la prezidento: Antaŭen kun novaj strategioj!
- Raportoj pri la Landa Kongreso kaj NASK
- Solvo de la "trinkajo-truko"
- ...kaj multe pli!

La Landa Kongreso omaĝas al Vilĉjo HARMON pro lia senlaca laboro por Esperanto en Usono kaj tutmonde

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ



Mezuroj: 142 mm x 90 mm

Averso:

numerita kaj personigita rabatokarto okaze de la dua rumania Esperanto-kongreso en Cluj, de la 8a ĝis la 10a de julio 1922.

Reverso: dulingva teksto kun informoj pri la rabato, por kongresanoj, de la ŝtataj fervojoj, por la periodo de la 6a ĝis la 20a de julio. Sube: la postkongresa programo.

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12^o
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20^o

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerner

POSTKONGRESAJ PRIPENSOJ

Varmaj estis la kongresaj tagoj! Tre varmaj... Nur la ĉeestintoj povas kompreni la ĝustan kaj tutan signifon de tiuj vortoj. La atmosfero estis fulmema. Pendis alte en la aero la apenaj videblaj nuboj minacaj. Oni antaŭsentis ian fulmotondron. Kaj tio neniel estas miriga, por tiu, kiu estas informita pri la konsisto de la elementoj, kiuj konsistigas la SAT-anaron.

Ĉiu scias, ke plej akraj politikaj bataloj ekzistas inter la diversaj tendencoj de la laborista movado. La partiaj gazetoj estas kvazaŭ plenplenaj je eksplodigaj polemikaj kaj venenaj gasoj. Ties legantaro estas saturita per bolantaj pasioj ĉiam pretaj elŝpruci. Se la energio kaj municio elspezita en la intertendencaj bataloj estas direktitaj sole kontraŭ la nuna malĝusta sociordo, estas dube, ĉu ties profitantoj povus daŭrigi sian parazitivan vivon. Sed pri tio nun ne estas la temo. Fakte estas, ke la anoj de la diversaj tendencoj kaj partioj kelkfoje rilatas inter si tre neĝentile, eĉ malamikite. Sekve estas tute nature, ke la ĉeesto en sama ĉambro de 662 personoj ŝarĝitaj de malsama elektro kreas tian fulmeman atmosferon.

Se fulmo-detruas, okazas ankaŭ iafoje, ke ĝi nur purigas la atmosferon. Tiel okazis en Leipzig, en la impone bela salonego de la "Volkshaus" (Popoldomo).

La ĉi poste presita Rezolucio, kiu estis akceptata unuanime, signas revenon al pura, sana stato.

Dum la interkongresa jaro ensteliĝis polemikoj sur la paĝoj de nia gazeto. La Legantaro certe fojos de la konstato, ke "S-ulo" tute purigis je malicaĵoj kaj incitaĵoj.

Sed kiel do povas okazi, ke en la esperanta laborista movado la konfliktoj ĉiam solviĝas kontentige, ĉiam formalaperas la nigra fantomo pri skismo? Bele respondis al tiu demando K-do von der Heid, kiu je la nomo de la Kongres-prezidantaro faris la finparolon. En la

Se la atmosfero refariĝis pura en SAT, se ni evitis la skisman malsanon, kiu tiom malfortigas la laboristan movadon, ĉu eble ne estas pro tio, ke ni ĉiuj, pli malpli konscie, estas unue esperantistoj kaj nur due partianoj? Mi ne provos respondi al tiu demando; sed en ĵusa okazo ni neniam konfesu tiom en nacia lingvo...



esperanta laborista movado regas la "interna ideo" — proleta. Sendube tiu unuiga ideo ne estas la sama kiel tiu de Zamenhof. Tamen ĝi estas el la sama speco; ĝi konsistas el sindonemo al la afero, el espero, el forta sento pri justo kaj hono, pri volo kaj decido batali unuice per esperanto por la liberigo de nia klaso el sub la jugo de l' kapitalismo.

En SAT ja nun ankoraŭ regas tia proleta "interna ideo". Nia movado kreskas kaj fortiĝas dank' al la sindono kaj sinforgeso de miloj da K-doj, dissemitaj en ĉiuj regionoj de l' mondo.

Ni devas zorgi, ke tia stato neniam senfortiĝu; ni devas ĝin flegi, neniam forgesante, ke tio estas kondiĉo sine qua non, de speciala speco, por la bona kaj prospero de nia helpe liberiga, eduka, kultura SAT-entrepreno.

montras, ke niaj K-doj konsilis pri sia tasko kaj ne venis al Leipzig por alia celo ol labori en la servo de nia movado.

REZOLUCIO

La Kongreso

1. konstatinte unuflanke, ke la eldono de "La Laborista Esperantismo" estis larita laŭ maniero, kiu povis kredigi, ke tia verketo celis fariĝi la oficiala programo de nia Asocio; alidite la konfeson de la Direktoro, ke tio estis "mispaŝo"; konstatinte duflanke, ke

a) la paragrafo unua de la statuto plene difinas la celojn kaj taskojn de SAT;

b) ke la 8. SAT-Kongreso bone difinis la rolon de SAT, dirinte ke ĝi ne estas politika, sed nur kleriga, eduka, kultura

HISTORIAJ ASPEKTOJ

9a SAT-kongreso Leipzig 1929



Lando: Germanio

Materialoj: teksaĵo, lado kaj latuno

Mezuroj: 44 mm x 36 mm

Jaro: 1929

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Fabrikanto: Dr. R. Morisse & Co
Elberfeld

Diko: *serĉata*

Averso:

cirkaŭe: orkolora (latuna) rando, fiksita dorse per ok pinĉiletoj

ene: teksaĵa bildo diverskolora

supre: AŬG. / verda stelo kun "SAT" / 1929

sube: mondglobo kun surskriboj: "LEIPZIG / ESPERANTO / KONGRESO"

Reverso:

horizontale -meze: pinglo sur blua fono

sube: "DR.R.MORISSE & CO / ELBERFELD"

Rimarko 1:

La insigno apartenis al la svisa ĵurnalisto, poste diplomato, René Naville (1905-1978), kiu kiel korespondanto de "Revue de Genève" ĉeestis en sovetia Kartvelio, en la urbo Tiflis. Dum interparolado kun la avino de la aktuala posedanto, Naville sukcesis persvadi ŝin aliĝi al la esperantista societo en Tiflis. Danke li donacis la insignon al ŝi.

Rimarko 2:

La 9a SAT-kongreso en Lepsiko (Leipzig) okazis inter la 4a kaj la 10a de aŭgusto 1929. Partoprenis 650 homoj el 22 landoj.

Rimarko 3:

Aperis kritiko de komunistaj SAT-membroj pri la laŭ ili oportunisma, neklasbatala gvidado de SAT kaj pri la laŭ ili malaprobinda eldono de broŝuro “La Laborista Esperantismo”, kiu devigis aktivajn membrojn aboni la oficialan revuon de SAT. Sekvis la likvido de la Programkomisiono.



La ENA-redakcio elkore dankas membron Maksim Federov pro la informoj pri tiu objekto.

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Provaĵo por sovetia insigno de 1958



Jen provstampo en aluminio, kies diametro estas 27 mm kaj kiu pezas 3,07 g; la diko estas unu mm.

Supre, trueto kaj ŝnureto. La reverso de la provaĵo estas senbilda, sed tamen montras stampospurojn.



La surbaze de la provaĵo farita insigno estas bildo kun stelo, sed sen la lamena “tortorando” de la provaĵo. La definitivaj insignoj mem havas diametron de 23 mm kaj pezas 1,62 g. Ili ekzistas en du emajlitaj tipoj: unu kun rando en la sama blua koloro kiel la centra parto kaj la alia kun rando en la sama verda koloro kiel la stelo. Averse videblas la vorto “Esperanto” ruse kaj esperante. Dorse estas impregnitaj surskriboj: supre: П-Д ФС kaj sube: П.15к. = **Prezo 15 kopekoj.** (*traduko de Jozefo Horvath*)

Eblas identigi ilin kiel insignojn de la 1958a Monda Ekspozicio en Bruselo (Belgio), ĉar la stelo aspektas kiel la ekspozicia simbolo.



La insigno, dum la ekspozicio videbla sur vestoj de sovetianoj, havis la funkcion reklami por Sovetunio, kvazaŭa subtenanto de Esperanto, kvankam nur du jarojn antaŭe la soveta ŝtato estis daŭre persekutanta esperantistojn. Esperanto nur en 1959 ne plu estis konsiderata kiel kontraŭleĝa movado.

TERMINARO

Alfabeto listo (33)

keĵlo: konusforma peceto de metalo por ŝtopi trueton en monero kun nur intrinseka valoro. La funkcio estas ĉu ripari, ĉu meti ĝin en intence faritan trueton, por korekti la oficialan pezon.

martelprezo: la plej alta prezo proponita dum aŭkcio. Tamen ne inkluzivante taksojn diversajn.

soliduso (lat. *solidus*): romia ora monero, anstataŭiginta la t.n. "aureus" (oran moneron) ĝis la fino de la bizanca epoko (10a jc.). Plej ofte uzita por finance rekompenci dungsoldatojn. Ĝi estis la romia vorto, el kiu devenis ambaŭ "soldato" kaj "soldo" (= salajro de soldato).

kupelado: disigo de plombo kaj arĝento, tiel ke estiĝas plomboksido, kombinaĵo de plombo+oksigeno

kupelujo: recipiente, en kiu estas disigataj arĝento kaj plombo.

patinigo: artefara (ofte permane) aldono de artefarita "patino" al objektoj el diversaj substancoj (ligno, metalo...). La rezulto estas tuj videbla.

patiniĝo: la spontana, longa proceso de la estiĝo de patino pro eksteraj influoj, ekzemple oksigeno.

kreditkarto: karto, kiu ebligas al aĉetanto aĉeti sen kontanta mono.

debeto: tuto de ĉiuj sumoj ŝuldataj de iu al komercisto.

kredito: konfido, kiun ĝuas prunteprenanto aŭ nekontante aĉetanto pro sia akurateco en pagado de ŝuldoj.

fronto: > averso

dorso: > reverso

randumo: ĉirkaŭa surfaco de peco, geometrie prilaborita. Ĝi povas ankaŭ montri skribaĵojn.

modulo: diametro de la cirkonferenco, kiu limigas la pecon.

pezo: de la monero aŭ medalo, esprimita en gramoj.

titro: rilato inter la ĉefa metalo kaj la resto de materialoj.

alojo: homogena unuigo kaj kunfando de du aŭ pliaj metaloj aŭ materialoj.

stampaĵo: legendo(j) kaj bildo(j) de la du flankoj de monero aŭ medalo.

figuro: figuraj elementoj de ĉiu flanko.

NUMISMATIKA FORUMO

Ĉu kontanta mono ankoraŭ estas bezonata?

1. La situacio en Eŭropa Unio

En la aktuala, bitigita ekonomia epoko, elektronika pago por la plimulto de la loĝantaro estas relative facila transakcio. Tamen, minoritatoj ŝajnas daŭre alligataj al kontantaj pagiloj.

Je la komenco de la nova jarcento financaj fakuloj prognozis, ke kontanta mono baldaŭ estos nur uzata en etskalaj kaj specifaj situacioj, kiel en la vestejoj de publikaj naĝejoj, en lokaj noktaj butikoj aŭ en skoltejoj, kiuj organizas specifan profitcelan manĝon. Ili klare eraris, tiuj profetoj! Aktualaj raportoj de naciaj bankoj montras, ke nuntempe cirkulas pli da kontantaj pagiloj ol en la pasinteco, dekfoje pli ol antaŭ unu jardeko. Tamen, en tiu periodo malaperis la duono de la bankaŭtomatoj el la urbaj centroj. La Eŭropa Centra Banko kalkulis, ke ĉirkaŭ 80% de la kontanta mono ne plu cirkulas, sed estas enŝparujigata.

Landoj ekster Eŭropa Unio ofte uzas ĝin kiel alternativon por la propra, nestabila monunujo. En aliaj landoj la krimularo misuzas ĝin por la sukcesplena nigra merkato. La germana ekonomikisto Friedrich Schneider konstatis, ke tiu merkato valoras pli ol 16,1% de la malneta enlanda produkto de eta lando kiel Belgio. Kvankam certaj gejunuloj pretendas ne posedi kontantan monon, ili, por ŝtate eviti impostojn, ne hezitas uzi kontantan monon, do profitcele.

Personoj, kiuj ankoraŭ posedas kaj uzas kontantajn pagilojn, estus diĝitaj analfabetoj aŭ homoj, kiuj timas financajn krizojn, kiel dum la bankaj krizoj de 2008. Tiuj lastaj ne returnis sin al la bankoj post la krizo. Aktuale tiu timo denove kreskas pro la ŝtataj ŝuldoj kaj kreskantaj impostoj. Krome rolas pandemioj kaj militoj dise en la mondo. La kutima reago estas konservi monon en la propra domo aŭ aĉeti kvant(et)on da oro.

Tamen ankaŭ bankoj mem promenas en nubo de kulpeco. Jam ofte ili (mis)uzis datumojn de la klientoj por personigitaj anoncoj kaj per specialaj leĝoj la fisko rajtigis al si kontroli la saldojn de klientoj. Estas evidente, ke tiuj klientoj ne plu emas konfidi sian pene perlaboritan monon al la bankistoj.

Kvankam certaj politikistoj preferus aboli kontantajn pagilojn, kvazaŭ por eviti kostojn bezonatajn por fabriki bankbiletojn, transporti kaj regule detruigi ilin. La Eŭropa Centra Banko antaŭ nelonge konfirmis, ke ĝi protektos la uzon de kontanta mono, minimume ĝis 2030.

Tamen, ekde julio 2023 ekfunkcios nova financa sistemo, kiu devigos al ĉiuj entreprenoj akcepti elektronikajn pagilojn. Se la lastaj 20% de la entreprenoj devige akceptos diĝitajn pagilojn, la lasta butikuma ĉareto trovos ripozejon en muzeo de industria arkeologio.



2. Kontanta mono en Usono kaj Ĉinio

Laŭdire kontanta mono malkutimiĝus. Kion do faru iu, kiu ne posedas propran ĝirkonton, kiel 15 ĝis 20 procentoj de la usonanoj? Kreskas diversloke en Usono la alvoko krei novan leĝon, kiu devigu akcepti kontantan monon. Fakte, en diversaj grandaj urboj kreskanta nombro da restoracioj, lunĉejoj kaj aliaj negocoj rifuzas kontantan monon. Kliento, kiu en tiuj negocoj volas pagi per tute oficiala usona pagilo, ne ricevas manĝaĵon aŭ trinkaĵon. Vere kruela speco de diskriminacio, ĉar la plimulto de homoj sen ĝirkonto estas malriĉuloj! Laŭ ekzameno de Federal Reserve (federacia banko), triono de la etaj elspezoj estas pagataj per kontanta mono. Krome, sur ĉiuj bankbiletoj troviĝas la surskribo “Valida pagilo por ĉiuj privataj kaj publikaj ŝuldoj”. Dume en New Jersey [novĝersi] leĝo tiurilate estas preparata. Same en New York (Novjorko) kaj Washington DC (Vaŝingtono). En Chicago (Ĉikago) la iniciativo malsukcesis. Tia problemo tamen ekzistas ankaŭ en la Popola Respubliko Ĉinio. La Ĉina Centra Banko skoldis vendejestrojn, kiuj rifuzis kontantan monon. Oficiale “pro la intensa protesto de la popolo”, sed probable ankaŭ aŭ eĉ unuavice por bremsi la dominon de du firmaoj, kiuj kontrolas la merkaton de pagoj per poŝtelefono: Alipay [alipej], posedanto de la reta vendejo Alibaba kaj Wechatpay [viĉetpej], de la konkuranto Tencent.

La industrio plendas pro la altaj kromkostoj de kontantaj pagiloj. Laŭ ili oni bezonas nur duonon da minuto per kreditkarto, tutan minuton por kontanta mono. Granda diferenco do, kiam vicostaras multaj aĉetantoj. Kreditkarto ankaŭ malhelpus ŝtelistojn, samtempe helpus klientojn unuflanke, servistojn aliflanke. Tamen, en kvartaloj kun multaj krimuloj, vendejoj akceptas kontantan monon, ĉar en tiuj kvartaloj loĝas multaj homoj sen kreditkarto, kiuj tamen estas fidelaj klientoj. Devigante la uzon de kreditkarto vendejestroj forpuŝas malriĉulojn el riĉaj kvartaloj kaj el la urba centro.

En Usono kvinono de la familioj posedas nek kreditkarton, nek daŭran krediton aŭ hipotekon. Unu el 15 familioj neniam vizitas bankon. Ofte, kvarono de la loĝantaro troviĝas sub la limo de malriĉeco. Krome, aktivigi ĝirkonton kostas multe da mono kaj elspezi tro da mono estas severe punata de la bankistoj. Personoj sen banko ofte estas enmigrintoj sen oficialaj dokumentoj aŭ usonanoj devenaj el kulturoj sen fido koncerne bankojn, kiel azianoj.

Krome ekzistas ankoraŭ mondcivitanoj kiuj havas kreditkartojn, sed malgraŭ ilia bonhavo ili



THIS NOTE IS LEGAL TENDER
FOR ALL DEBTS, PUBLIC AND PRIVATE

preferas pagi kontante, ĉar nur tiel eblas rekonii kaj kontroli, kiom oni ekzakte elspezas. Tio evidente pli efike helpas personojn, kiuj posedas apenaŭ sufiĉe da mono kaj do mallukse transvivas.


Fonto: “De Morgen” (La Mateno), belga gazeto, jaŭdon, la 24an de januaro 2019.

EL LA GAZETARO

Ekspozicio en la Urba Publika Biblioteko en Gliwice



La 28-an de marto 2008a jaro en Urba Publika Biblioteko en Gliwice, ĉe la placo Inwalidów Wojennych estis malfermita ekspozicio "Esperanto-akiraĵo de pola kulturo". En la ekspozicio oni prezentis esperantaĵojn el kolektoj de gliwiceaj esperantistoj kaj precipe el kolekto de Stanisław Mandrak. La ekspozicion malfermis direktorino de Biblioteko Grażyna Lazar kaj prezidanto de PEA-Filio Gliwice Stanisław Mandrak. Ili salutis la ĉeestantojn kaj diris kelkajn vortojn pri la ekspozicio. La ekspozicio prezentis dokumentojn kaj memoraĵojn pri la historio de Esperanto en Pollando kaj en la mondo. En ĝi estis ankaŭ memoraĵoj, ligitaj kun la kreinto de Esperanto Ludoviko Zamenhof kaj kun aliaj famaj polaj kaj mondaj esperantistoj. Interesa estas kolekto de koloraj vidkartoj kun esperantaj surskriboj. Oni povas vidi esperantajn malnovajn librojn kaj ankaŭ librojn eldonitajn en la lastaj jaroj. Estis prezentitaj artikoloj el diversaj polaj revuoj, en kiuj estas informoj pri Esperanto. La ekspozicio estis bone aranĝita en granda salono, ĉiuj ekspoziciaĵoj estis en vitrinoj kaj bone videblaj.



40 jaroj de Bona Espero

Multaj esperantistoj konas, almenaŭ laŭnome, la italan familion Grattapaglia, pli ĝuste: la internacian familion Grattapaglia, ĉar la familipatro Giuseppe estas italo, dum la patrino (Ursula Sandkühler, el Berlino) estas germanino, kaj ili, kun la filoj, sentas sin mondcivitanoj.

Antaŭ kelkaj monatoj la familio Grattapaglia abrupte forlasis la elitajn vivon, kiun ĝi ĝis tiam ĝuis en Torino, kaj translokiĝis al Brazilo, kie, en regiono nomata Alto Paraiso en la ŝtato Goiás, ĝi prizorgas farmonlernejon kun la esperanta nomo "Bona Espero".

Multaj, ekscielite tion, restis mirŝokitaj, ĉar la socia pozicio de la familio Grattapaglia en Torino



ests enviinda, kaj precipe dinamisma estis la agado de la familipatrino Ursula, kiu estis komisiita pri publikaj rilatoj de la estroj de la

aŭtomobilfabriko Fiat, scias plurajn lingvojn kaj prizorgis altnivelajn kontraktojn. Certe, tute alia situacio ol vivi en fora lando, en preskaŭ

senhoma regiono, melkante bovinojn kaj bredante ĉevalojn!

Sed la vojoj de la Spirito estas senfinaj, kaj elekstere oni ne povas plene kompreni la ĝojon de la homo, kiu trovis sian ĝustan situon en la socio, kaj estas feliĉo, ĉar li povas, fine, realigi sian memon kaj realigi siajn revojn.

Tiu feliĉo klare aperas el la leteroj kiujn la ge-Grattapagliaj sendas de tempo al tempo. En Brazilo, kaj pli precize en la Esperanto-bieno "Bona Espero", ili trovis ja novan vivmanieron, kiu baziĝas sur reciproka respekto kaj helpo.

Ni citas la plej jusan leteron, kiu alvenis al Radio Roma el Bona Espero:

"Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco ni sendas al vi ko-

rajn pensojn el malproksima centra altebenajo de Brazilo. Ni regule kaptas ĉi tie la itallingvan elsendon "Italia 24 ore", sed bedaŭrinde la dimanĉa rendevuo kun viaj Esperanto-elsendoj ne funkcias! Sendube tio dependas de la potenco de via elsendilo kaj de la malproksimeco de nia regiono.

Eble niaflanke la situacio pliboniĝos, kiam sur la pinto de apuda monto, kiu signas la limon de "Bona Espero", oni instalos grandan antenon por plibonigi la radiajn kaj televidajn ricevojn en tiu ĉi regiono. Ni ja situas je 250 km norde de Brazilo, ekzakte sur la 14-a paralelo sude de la ekvatoro. Ni ĝojis, kiam oni elektis nian monton por instali tiun antenon. Speciala aviadilo alteriĝis ĉe ni aŭtaŭ nelonge

(en Bona Espero ekzistas 1.200 km longa aerodromo, kaj teknikistoj de la brazila radiotelevida instanco konstatis, ke ĉi tie ekzistas favoraj kondiĉoj por tiu instalaĵo. Do – finas la letero – ĝis baldaŭa... reaŭdo, kaj akceptu la plej varmajn salutojn de ĉiuj bonesperanoj!"

La geedzoj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia ricevis la medalon de toleremo de la Fonduso Zamenhof – vidu artikolon ĉe la retejo de EL Popola Ĉinio: http://www.esperanto.com.cn/2013-12/26/content_31009885.htm. Indas ankaŭ legi la mallongan resumon pri Bona Espero ĉe http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero.

Ret-Info / Lingvo-Studio



Horizon-taal Jarkolekto 46 n-ro 268 julio-aŭgusto 2014

R E T P O Ŝ T O

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

16.01.2023 10:58

Saluton, kara Jozefo!

Hodiaŭ mi sendas per We Transfer la unuan numeron de la deka (!) jarkolekto. Do, la unua jubilea jaro de la revuo sin nun anoncas. Via kontribuo estis pasintecce nemalhavebla kaj estos sendube tia, se vi akceptos daŭrigi vian helpon. Mi samtempe dankas vin pro viaj penoj kaj antaŭdankas vin pro la ankoraŭ farenda kaj farinda provlegado.

Amike kaj numismate,

Bert

19.01.2023 11:29

Kara Bert,

volonte mi helpas en utila kaj nobla afero, kiom mi kapablas. La jubilea jaro indikas, ke vi atingis tian pinton, pri kiu ne tre multaj Esperantaj revuoj povas fieri dum la historio de Esperanto. Kaj per via Terminaro vi same atingos unikaĵon, valoron ne ĉiutagan en Esperantujo.

Tamen ni revenu al la realo. Permesu al mi du rimarketojn:

- 1) korekta: ne egalas al *ĝusta*. *Korekti* signifas plibonigi, do *korekta* signifas pliboniga. Mi scias, ke en multaj eŭropaj lingvoj *correct/korrekt* signifas *ĝusta*. Tamen en Eo tiu signifo, eĉ se ofte uzata, almenaŭ lamas.
- 2) Mi proponas al via kara edzino Vivienne rekontroli la pretajn manuskriptojn per la tekstilo LibreOffice, kiu havas Esperantan literumilon. Oni povas elimini multajn mistajpojn, uzante ĝin.

Mi sendas la reviziaĵon per WeTransfer.

Amike: Jozefo

25.01.2023 17:00

Kara Jozefo,

Unuavice multan dankon! Tamen la temo pri kiu mi volas paroli, (eventuale diskuti...) estas la uzo de certaj komoj en Esperanto.

Ekzemple: Mia patro, kiu jam forpasis, estis instruisto.

Mia patro kiu jam forpasis, estis instruisto.

Nur unu absolute bezonas komon. Tiu sen komo estas absurda. (laŭ la nederlanda regularo)

Alia ekzemplo:

La murdisto kiu eskapis, malaperis en la arbaro.

La murdisto, kiu eskapis, malaperis en la arbaro.

Ambaŭ povas esti ĝustaj, depende de la kunteksto.

Mi havas la impreson, ke la esperanta gramatiko ne agnoskas la diferencon, sed eble mi eraras surbaze de la nederlanda...

Amike,

Bert

25.01.2023 19:22

Kara Bert,

striktaĵoj, do normaj reguloj de ortografio mankas en Esperantujo. Estas kelkaj skoloj, kiuj sekvas logike ian sistemon, ekz. Monato, kiu estas unu el la plej influhavaj presaĵoj (elektronika medio).

Do laŭ mi gravas la konsekveneco (pro tio mi rekomendis la Monato-proponojn). Ĝuste ĝi mankas en Esperantujo. La plej facila maniero, resti konsekvenca, estas sekvi la sintaksan/morfologian strukturon de la frazoj. Do post ĉiu frazo (subfrazo, propozicio) metu komon. Intermetitan frazoparto(j)n same oni metu inter komojn. Sube mi donas kelkajn ekzemplojn:

- 1) La polico arestis la krimulon, kiu sensukcese rifuĝis en la arbaron (du propozicioj en subordiga rilato en kompleksa frazo).
- 2) Ili atendis min ĉe la restoracio, kune ni iris hejmen (du propozicioj en apudmeta rilato en kompleksa frazo).
- 3) Mia patro, kiu jam forpasis, estis instruisto (intermetita subpropozicio en komplementita frazo).
- 4) Mia edzino, pri tio mi rakontos poste, ne permesis eliri (intermetita propozicio en apudmeta rilato en komplementita frazo).
- 5) La amaso volonte restis, mi ne miras, la koncerto estis fenomenala (intermetita propozicio en apudmeta rilato en kompleksa frazo).
- 6) Mi ne neas, ho ne, vian talenton (intermetitaj frazpartoj en komplementita frazo).

Do, kara Bert, gravas esti konsekvenca. Komprenoble senkomeco plej malofte kaŭzas miskomprenojn, ja la ĉirkaŭteksto preskaŭ ĉiufoje unusencigas, kaj ne estas gramatika eraro. Tamen jen ekzemplo iom legendeca, kiam la komoj fariĝis vivnecesaj. Konspirantoj volis mortigi la edzinon de la hungara reĝo Andreo 2a, sed antaŭe konsultis la ĉefepiskopon, kiu donis al ili jenan ambivalentan konsilon:

"Mortigi la reĝinon vi ne devas timi estos bone se vi ĉiuj konsentas mi ne obĵetas."

a) Mortigi la reĝinon vi ne devas, timi estos bone, se vi ĉiuj konsentas, mi ne, obĵetas.

b) Mortigi la reĝinon vi ne devas timi, estos bone, se vi ĉiuj konsentas, mi ne obĵetas. -:)

Do ne tro zorgu, Bert!

Kun amikaj salutoj: Jozefo



09.01.2023 18:25

Estimata Sinjorino Hauge,

Kiel UEA-samdelegito mi trovis vian retadreson en la Jarlibro.

Mi aktuale preparas novan numeron de la ENA-revuo, sed ne trovas la nomon de la konstruego supre sur la priskribenda medaleto ĉi-sube. Do, mi petas vian helpon, ĉar en Google mi ne trovas respondon.

Vin elkore mi antaŭdankas kaj danke kaj rekompence mi kunsendas la pli aktualan numeron de la revuo, tute nedevige evidente!

Altestime,

Bert Boon

09.01.2023 23:31

Saluton Bert,

atente rigardinte la medaleton, mia edzo kaj mi konkludis, ke la konstruaĵo estas "Kaiserstallung", parto de la kastelo. La proporcioj ne ĝustas kaj la reprezento estas sufiĉe kruda, sed la du apudaj turoj klare montras, ke devas esti ĝuste tiu konstruaĵo.

Dankon pro la donaceto!

Ĉion bonan,

Sabine Hauge

09.01.2023 23:42

Eble interesas vin ankaŭ la nomoj de la turoj, do: antaŭe maldekstre Fünfeckturm kaj malantaŭe dekstre Luginsland.

Sabine



20.01.2023 14:44

Estimata s-ino Harmon, kara Lucille,

Via patro, William, estis membro de ENA kaj mi trovis vian nomon en la UEA-jarlibro.

Mi trovis malnovan anoncon en kiu estis menciita, ke via patro, pro liaj multaj meritoj kiel esperantisto, ricevis belan, arĝentan medalon. La artikolo montras lin kun la medalo en la manoj.

*Po povi aldoni kaj priskribi tiun medalon en la ENA-revuo kaj sekve en la unua numismatika katalogo, mi bezonas: **fotojn de ambaŭ flankoj, la diametron, la pezon en gramoj, la dikon kaj eventuale la nomon de la medalisto.***

*Krome mi serĉas helpon de vi aŭ de alia usona samideano por trovi kaj priskribi **aliajn usonajn esperantajn medalojn** por la samaj revuo kaj baldaŭa katalogo.*

Mi do bezonas kaj petas vian helpon, ĉar minimume la medalo dediĉita al via karmemora patro ne estu forgesota de estontaj generacioj de esperantistoj.

Anticipe mi jam dankas vin kaj elkore salutas vin

amike kaj numismate,

Mag. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko por Belgio



23.01.2023 13:05

Kara Bert,

dum nia pasinta numismatika monatkunveno, nia membro prezentis monerojn de multaj tre malgrandaj teritorioj el la tuta mondo. Kelkaj teritorioj ekzistas, aliaj ne plu. Por ekzemplo li montris al ni monerojn de Norman-insuloj (Jersey, Guernsey), de la insulo Man kaj la pluajn de etaj teritorioj de Afriko, Azio. Ameriko ... Min interesis la teritorio Moresnet, kiu nun apartenas al Belgio. La germano D-ro William Molly proponis en 1908 por tiu tiam neŭtrala Moresnet novan titolon "Amikejo" kun oficiala lingvo (krom la franca, nederlanda, germana kaj "Low Dietsch", dialekto de la limburga lingvo) ESPERANTO. En Interreto estas (por mia celo) sufiĉe da informoj pri tiu ĉi afero. Mi preparis apartan skriban "prelegon" (tekston) kaj uzis por ilustrado kelkajn frankojn belgaj kaj francaj (el Interreto), kiuj tiam (1816, 1830-1920) estis oficiala mono por tiu teritorio. Mi devas konfesi, ke mi dum la prezentado de nia membro ne rimarkis, kiujn monerojn li havis en sia albumo por Moresnet, ĉar nur poste mi eksciis iom detale pri ĝi.

Nun mia demando: ĉu estis ie aparte publikigitaj bildoj de la moneroj de Moresnet? Aŭ ĉu mi povas uzi por ilustrado iujn ajn frankojn kaj la belgajn kaj la francajn de la jaroj 1830-1920? Mankas al mi etaj moneroj! Anticipe mi dankas vin. Mi alkroĉas tekston - dume en ĉeĥa versio - precipe pro la uzitaj bildoj.

Salutas Josef. Kříž

24.01.2023 18:04

Kara Josef,

mi ĝojas, ke mi povas helpi vin. En jarkolekto 4, n-ro 1, paĝon 12 troviĝas 5- paĝa teksto ilustrita, pri la neoficialaj moneroj de Moresnet (vilaĝo Kelmis) en Belgio. Mi aldone sendas al vi la Word- version, por ke vi povu kopii la fotojn por iu ajn prelego. "Kostis" al mi multe da peno kaj tempo por kolekti la fotojn, ĉar ĝis nun probable ne ekzistas fonto kiu enhavas ilin komplete.

Estas evidente, ankaŭ interese, montri la oficialajn tiutempajn monerojn kiujn mi vidis en via artikolo. Post iom da tempo tiuj de Moresnet estis tiam oficiale malpermesitaj, ĉar ne oficialaj.

Antaŭ nelonge forpasis S-ro Schrymecker, instruinto de Esperanto kaj pioniro-prizorginto de la loka muzeo kaj de la historio de Moresnet.

Se la sendata artikolo ne respondas al ĉiuj viaj demandoj, simple nur petu kaj mi provos helpi vin.

Korajn salutojn al vi kaj al la membroj de via asocio. Ĉu neniu interesiĝus por la ENA-revuo? ENA havas membrojn ne-esperantistajn (ekzemple la Universitato de Vieno) kiuj tre ŝatas ricevi nian revuon!

Amike kaj samideane,

Bert



18.01.2023 22:39

Estimata samidean(in)o,

Aldone mi sendas al vi(a) (instituto) kelkajn informojn pri esperanta medalo farita de japana medalisto-gravuristo. Pri tiu artisto mi petas -se eble- sendi al mi fot(et)on kaj informojn pri lia artistika kariero kiel medalisto. Mi bezonas tion por povi verki artikolon en la revuo de ENA pri Tenshodo Silver, kiun mi aldone rekompence kaj dankeme sendas al vi.

La Memora Medalo de UMEA-Premio

Lando: Japanujo / Japanio

Pezo: 250 g.

Eldonkvanto: (?)

Diametro: 75 mm

Diko: 6 mm

Metalo(j): arĝento



Medalisto-gravuristo: Tenshodo Silver / GINZA Tenshodo TOKYO?

Jaro: 1973. Okaze de: transdono de la Shinoda-Premio por meritplenaj esperantistaj medicinistoj

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

24.01.2023 4:02

Estimata,

Saluton el Japana Esperanto-Instituto.

Mi jam kontaktis la kompanion Tenshodo pri la informoj kaj disponeblaj fotoj, kaj nun atendas ĝian respondon.

Informe, ekzistas la retpaĝo de la kompanio en la angla lingvo kaj troveblas kelkaj informoj.

<https://www.tenshodo-global.net>

(Supozeble, vi jam trovis ĝin...?)

Kiam la respondo el la kompanio venos, mi denove skribos al vi.

Sincere,

Aikawa Takuya, direktoro
Japana Esperanto-Instituto (JEI)
esperanto@jei.or.jp | <https://www.jei.or.jp> Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo, 162-0042
JAPANIO

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.01.2023 17:11

Saluton Bert,

Koncerne la ENA-revuon kiun vi sendis al mi, mi plisendis ĝin al 10 de miaj E° konatuloj.

Supozante, ke viaj fotoj alvenis en via leterkesto **sekaj**, mi kontentas, ĉar dum la tagoj post mia forsendo ekpluvegis !!!

**Fartu bone ... la preparado de tiu magazino devas esti komplika kaj grandega!
Gratulon!**

Kore salutas,

Mireille Storms

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

28.01.2023 16:49

Gratulon pro la jubileo!

Salutas amike,

Frank Merla

[FraLi.net/reciprok](https://www.frali.net/reciprok)
groups.io/g/frali/message/36
www.miavivo.net/?status/5-5-1674920515/
<https://www.miavivo.net/?status/5-5-1674920515/>

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

28.01.2023 17:22

Jubilean dankon, kara Bert!

Salutas kore, Walter

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

28.01.2023 18:01

Saluton Bert

Dankon pro la bela numero de la jubilea jarkolekto!

Nun ĝi jam troviĝas en la kolekto: [ena-j10n1-202301.pdf \(alcl.be\)](#)

Elkorajn salutojn,

Albert Claesen
vikiflandrio.alcl.be

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.01.2023 13:04

Kara Bert,

Denove ĉi lasta numero de la ENA-revuo estis ege interesa.

Pro tio mi proponas, ke vi propagandu ĝin foje en Horizon-taal ekzemple publikigante unu el la ĉefartikoloj kaj aldone la instigon kontakti vin por akiri la abonon. Tiamaniere tio ne postulos tro da laboro por vi.

Amike,

Katja

31.01.2023 18:50

Kara Katja,

multan dankon pro viaj bonegaj ideo kaj propono, kiuj fakte ne kostus tro da laboro.

Mi tamen demandas min kiom da revuaj- A4 paĝoj estus je mia dispono? La tuta rubriko "Moneroj & Medaloj" estus probable tro, kvankam ili estas la "koro" de la revuo. Eble vi mem preferus iu ajn artikolon el la lasta aŭ alia numero kiel taŭga ekzemplo, ĉu? Mi sendube aldonos la varbilon kun klarigoj post la artikolo.

Amike kaj antaŭdanke,

Bert

01.02.2023 11:41

Kara Bert,

Fakte mi tre spontane sendis mian reagon. Nun mi pripensas ke vi transsendu nian korespondadon al Piet kaj Yves, ĉar ili respondecas pri la enhavo.

Mi preskaŭ certas, ke ili pozitive reagos, sed mi ne volas, ke vi farus laboron kaj poste konstatus ke estus vane. Ekzemple, mi ne scias ĉu ili preferas nederlandlingvan tekston aŭ Esperantan aŭ dulingvan.

Pri la elekto vi prefere mem decidu. Mi ŝatis la rakonton pri la velŝipo; ĝi iom pensigas pri la nuna uzado de Esperanto sur la futbalo de la mondĉampionado en Kataro. Sed, estis aliaj vere interesaj sciindaĵoj.

Vi povas pli bone juĝi kion la ĝenerala publiko povus plej interesiĝi ĉar vi ricevas ofte komentojn pri artikoloj.

Amike,

Katja

01.02.2023 17:01

Karaj samideanoj,

Laŭ instigo de nia Katja, iniciatintino de la projekteto, mi, volonte preta por kunlabori por la revuo, transsendas al vi nian korespondadon.

Amike kaj numismate,

Bert

08.02.2023 13:25

Saluton Piet,

ĉu vi vidis la sugeston de Katja? Ĉu vi proponos al Bert, verki por la junia numero?

Ni povus en la nuna numero jam mencii, ke aperis "jubilea jarkolekto" en kiu vi kiel kutime trovos interesajn kaj multvalorajn artikolojn koncerne (esperantan) numismatikon kaj anonci, ke aperos prinumismata artikolo en venonta numero?

Ĉu vi mem estas membro de ENA kaj vidis tiun jubilean numeron?

Amike

Yves

08.02.2023 14:49

Saluton Bert,

Reference al via korespondado kun Katja pri la jubilea jarkolekto, mi bonvenigus artikolon pri ENA, kaj artikolojn kiuj povus interesi legantojn sen specifa intereso pri numismatiko (kiel mi ;-)). Okaze de la jubileo, eble artikolo pri la (ne tro longa ?) historio de ENA ŝajnas al mi interesa. Aldone bonkvalitaj, t.e. printeblaj fotoj (min. 500 KB, prefere 1000 kB) bonvenas.

Anticipan dankon.

Piet

08.02.2023 16:17

Saluton al vi ambaŭ, Piet kaj Yves,

Dankon pro via intereso!

Mi proponas sendi aldone la artikolon en la aktuala numero (jk.10, n-ro 1) kiun preferas Katja. Krome unupaĝan varbilon, en kiu estas skizataj la historieto de ENA, la celoj, la avantaĝoj por membroj-abonantoj kaj tiel plu.

Mi esperas kaj supozas, ke la fotoj estas sufiĉe bonkvalitaj. Se necese, mi povas sendi ilin krome unuope.

Ne hezitu ankoraŭ provlegi la tekstojn!

Amike, numismate kaj ne dankinde,

Bert



31.01.2023 16:26

Estimata Jubileanta Krea Komunumo de Esperanto-Numismatika Asocio!

En la nomo de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo ni tutkore gratulas Vin pro *Via elstara agado: „Historio sur flugiloj de Arto, Poresperanta Agado kaj Filozofio”*

per la UMEA-jubilea medalo, kiun iniciatis nia, karmemora grandprestiĝa kolego kaj amiko **D-ro István Hegyi** [https://eo.wikipedia.org/wiki/István_Hegy_i_\(esperantisto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/István_Hegy_i_(esperantisto)) altestime kaj plej amike *d-ro Ludoviko Molnár kaj d-rino Julinjo Farkas*



From: medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com [mailto:medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com]
On Behalf Of Bert Boon**Sent:** Saturday, January 28, 2023 4:34 PM**To:** Bert Boon**Cc:** Bert Boon**Subject:** ENA-
revuo Jubilea jarkolekto 10 n-ro 1 2023.

31.01.2023 18:02

Kara Ludoviko, karaj fakgrupoj de BMEF,

En la nomo de ENA kaj propranome mi elkore dankas vin pro la afablaj gratulvortoj okaze de la dekjara jubileo de la numismatika faka revuo. Mi esperas, estonte povi aldoni diversajn al mi ankoraŭ nekonatajn (mal)novajn UMEA-medalojn al la UNUA KATALOGO finpreparanta en 2023!

Amike kaj numismate,

Bert Boon

31.01.2023 18:16

Karaj Julinjo kaj Ludoviko,

Al vi ambaŭ persone mian dankon pro la gratuloj!

Agrabla surprizo estas la aldonita foto de al mi nekonata UMEA-medalo el 1987, kvankam mi jam priskribis diversajn aliajn specimenojn medicinistajn, kiel vi scias.

Sekve mi ne povas ne peti al vi, havigi al mi -se eble- plejeble multajn informojn laŭ la modeloj en la rubriko "Moneroj & Medaloj". Se eble, ankaŭ kompletajn fotojn de ambaŭ flankoj...

Mi tutkore antaŭdankas vin,

Amike kaj numismate,

Bert

04.02.2023 15:54

Kara Bert!

Dankegon pro Via letero.

„Per Arto kaj Esperanto por la Sano”

medalo-mezuroj de la UMEA II.KONFERENCO VESZPRÉM 1987: Lando: Hungario;
Metalo:kupro; Diametro: 85mm x 80mm; Jaro:1987; Kvanto: serĉata; Pezo: 250g; Medalisto:
L I Serĉata; Diko: 4mm; ambaŭflankaj fotoj estas aldonitaj.

Altestime kaj plej amike salutas Vin

Julinjo kaj Ludoviko

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

02.02.2023 11:31

Kara Bert,

ĉu vaksosigeloj estas afero de numismatiko? Kp. mian komenton en Instagram:



<https://www.instagram.com/p/CoIofDIjDqSfXEmkrXLwg6oSensrBc4nuLNurU0/>

Salutas amike,

Frank Merla

02.02.2023 12:54

Kara Frank,

la unua frazo(demando) el via letero estos certe la titolo de nova artikolo en la rubriko "Numismatikaj Aspektoj". Por la artikolo mi tamen bezonas informojn, sed la problemo estas, ke mi ne kapablas malfermi vian komenton en instagram (mi ne havas la programon).

Necesaj kromaj informoj estas: fotoj de ambaŭ flankoj, rilata evento de eldono, pezo, mezuroj, nomo de la skizisto, eldonjaro, eldonkvanto, diko.

Do, mi unuavice elkore dankas vin pro tiu surpriza kaj ŝatata sendo kaj petas vin havigi al mi plejeble multajn informojn...

Antaŭdanke, amike kaj numismate,

Bert

02.02.2023 13:03

Kara Bert,

bedaŭrinde mi ne havas detalojn pri la vaksosigelo, sed eble Gabriel Erikson, kiu enmetis la foton. Mi petas pardonon de Gabriel se li kontraŭas la malkaŝadon de lia retroŝtadreso al Bert.

Salutas amike,

Frank Merla



02.02.2023 12:39

Estimata Profesoro, kara samideano,

Kiel redaktoro de ENA-revuo kaj kompilanto de UNUA ESPERANTO-NUMISMATIKA KATALOGO, mi konstatis, ke esperantaj medaloj usonodevenaj estas (ege) raraj.

La medalon, kiun ricevis William Harmon, mi antaŭ nelonge vidis unufoje sur la koverto de aperinta numero de Usona Esperantisto. Bedaŭrinde mi ne havas informojn por povi montri, priskribi kaj aldoni al la katalogo tiun medalon.

Jen la necesaj informoj: bonkvalitaj fotoj de ambaŭ flankoj; pezo en g, diametro en mm, eldonkvanto, metalo aŭ alojo, diko en mm, nomo de la medalisto; eldonojaro. Mi do petas vin – se eble - havigi al mi plejeble multajn el tiuj informoj.

Mi jam sendis la saman peton al la filino(?) de karmemora William (longtempe membro de ENA), sed sen rezulto...

Kroma demando: ĉu ekzistas aliaj esperantaj medaloj en via lando?

Elkore mi antaŭdankas vin!

Altestime kaj samideane,

Mag. Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko



02.02.2023 16:00

Kara Bert,

Bedaŭrinde mi nenion scias pri eventualaj esperantaj medaloj en Usono. Mi plusendas vian mesaĝon al Hoss Firooznia, redaktoro de la informilo de Esperanto-Usono, kiu (kiel longtempa ano kaj homo kiu bone konas la usonan movadon) eble povos helpi.

Kore,

Humphrey

03.02.2023 11:31

Kara Humphrey,

Multan dankon pro via helpo. Dume Hoss jam montris al mi la vojon.

Permesu, ke mi iom rekompencas vian kunlaboron per la pli aktuala numero de la ENA-revuo.

Amike kaj numismate,

Bert Boon

03.02.2023 16:59

Koran dankon, Bert. Tiu numero enhavas amason da interesaj historiaj informoj – interalie pri la Schooner Esperanto, pri kiu mi antaŭe ne sciis.

Humphrey

04.02.2023 0:37

Kara Bert,

Laŭ mia kompreno, la medalo en la foto kun William Harmon estis unika afero, donaco nur por li. Do supozeble neniu aliaj ekzistas. La fabrikadon organizis Orlando Raola, tiam la Prezidanto de Esperanto-USA. Eble li povas doni al vi pli da informo pri la mezuroj, konsisto, ktp.

Mi ne plu havas lian hejman retpoŝtadreson, sed jen tiu ĉe la universitato, kie li instruas:

Amike,

- Hoĉjo

04.02.2023 6:55

Saluton, Bert!

Jen la detaloj de la medalo transdonita al Vilĉjo Harmon (la jam antaŭe farite, ne la farita laŭ peto).

Mi ne aŭdis pri aliaj medaloj ĉi tie.

Je via helpo, preta restas,

Dr. Orlando E. Raola

Instructor, Chemistry Department, Santa Rosa Junior College

04.02.2023 9:37

Saluton Orlando!

Multan dankon pro la interesa dokumento, kiu efike ilustras la preparan fazon. Por povi plejeble komplete priskribi la artefakton, mi bezonas pliajn detalojn. Por klarigi mian laboradon mi aldonas la lastan numeron de nia revuo kun en la rubriko "Moneroj & Medaloj" kelkaj ekzemploj. Tiel ili ricevas propran lokon en la kompilenda katalogo kun pli ol 200 unuopaj medaloj.

Mi denove elkore antaŭdankas vin.

Amike kaj numismate,

Bert



04.02.2023 10:15

Kara samideanino Margarita,

En sciigo de Stefan McGill mi legis vian anoncon pri la BET 57a. Mi gratulas pro la daŭra sukceso de via kongreso.

Mia letero ankaŭ estas helpopeto.

Baldaŭ ENA ekkompilos pli ol 200 esperantajn medalojn por la UNUA ESPERANTO-NUMISMATIKA KATALOGO. Bedaŭrinde, escepte de kelkaj specimenoj en broŝuro de Hans Jankowski, mankas medaloj esperantaj pri BET kaj aliaj medaloj el via lando, tiel riĉa je esperanta historio.

Mi do petas vin kompili plejeble multajn el la litovaj (mal)novaj medaloj.

Krome mi aldonas la lastan numeron de la ENA-revuo por montri (vidu la rubrikon "Moneroj & Medaloj") kiel ni priskribas medalojn.

Mi supozas, ke vi aktuale havas multe da laboro, sed tamen esperas, ke vi volas helpi nin.

Unuavice mi deziras sukcesplenan BET-kongreson kaj samtempe antaŭdankas vin.

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko por Belgio



15.02.2023 16:30

Mi peras mesaĝon por interesitoj pri Numismatiko:

Sciantoj bv kontakti kun Bert

De: Bert Boon <bert.boon@skynet.be>

Estimata samideano,

Aktuale mi preparas la kompiladon de la UNUA ESPERANTO-NUMISMATIKA KATALOGO. Sciante, ke ekzistas tre multe de hispanaj Esperanto-medaletoj (insignoj) eldonitaj okaze de naciaj kaj internaciaj kongresoj, mi volas kontakti hispanan samideanon kiu kolektas ilin aŭ iu kiu povas sendi al mi informojn.

Ĉu vi povus helpi min?

Mi elkore antaŭdankas vin

samideane kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

UEA-fakdelegito pri numismatiko

....

José Antonio del Barrio

<http://www.delbarrio.eu>

15.02.2023 16:50

Saluton Jose Antonio,

Multan dankon al vi, peranto de mia helpopeto.

Daŭre rekompence je via servo! Permesu, ke mi - evidente nedevige - sendas al vi la lastan numeron de la ununura numismatika revuo.

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.03.2023 15:47

Saluton!

Mi ŝatus aliĝi al ENA kaj ekricevadi la novajn numerojn de "Esperanta Numismatiko". Mi mem ne estas kolektanto de medaloj kaj moneroj, sed interesiĝas pri la historio de Esperanto ĝenerale, do ankaŭ pri tiu enhavoriĉa periodaĵo!

Amike,

Mihaelo Bento

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

A N O N C O J

&

E V E N T O J

Reklama anonco numismatika

Eĉ ege valoraj moneroj povas montri malbelegajn reziduojn!

Post zorga elimino de reziduoj en ruĝaj, verdaj kaj grizaj kolornuancoj, tri superbaj moneroj denove brilegas.

NCS (Numismatic Conservation Services = numismatikaj konservado-servoj) uzas diversajn fakistajn teknikojn por forigi nocajn makulojn, stabiligas kaj protektas la surfacon de monero kaj, sufiĉe ofte, eĉ plibonigas ties aspekton. Post kiam moneroj estas konservitaj de NCS, ili estas tuj transmisiataj al NGI (Numismatic Guaranty Company = numismatika garantia kompanio), aŭtonoma filio de NCS, kiu ilin plibonigas kaj enkonkigas.

Sube jen kelkaj ekzempleroj de superbaj moneroj freŝdate konservitaj de NCS kaj plibonigitaj de NGC.

Ĉi tiu ora 1 scudo, Savojo Dukujo, Italio (1576) antaŭ nelonge estis prezentita al NCS por alpaŝi la forigon de gravaj ruĝaj reziduoj, videblaj ĉirkaŭ la surskriboj kaj la devizoj. Netravideblaj reziduoj, kiel sur ĉi tiu ora ekzemplero, eble kaŝas originan surfacon, kio malhelpas la artefakton montri sian veran belecon. Tiaj ruĝaj reziduoj oftege troviĝas sur antikvaj oraj moneroj. Per faka forigo, la monero povas denove brilegi. Post la konservado ĝi povas denove altgrade elstari dank'al la servoj de NGC.



Moneroj povas diverskaŭze esti makulataj, ofte pro longtempa konservado en diversspecaj ujoj. La arĝenta, germana 1914D-marko estis prezentita al NCS pro verdeca, blanka reziduo, kiu kaŭzis “strekon” transverse al la aversa flanko. Tiaj strekoj ofte estas spuroj de diakilo, se ne, eble pro la uzo de polivinila klorido kiel konservilo. Fakula prilaborado savas kaj riparas la moneron brilege. Poste la NGC finlaboris ĝin kun multe da sukceso.



Do, kvazaŭa protektado en tipoj de malsuperaj konserviloj povas kaŭzi difektajn reziduojn. La ĉi suba ekzemplero estas kupro-nikela, superba 10 para / 1884a, serbia monero, enmanigita al niaj fakuloj, por forigi iun ajn grasecan reziduon je ambaŭ flankoj. Kupro-nikelaj moneroj fakte estas pli korodiĝemaj pro specifaj diversspecaj reziduoj, do necesas forigi ilin. Bonŝance tiu balkana monero ne jam estis damaĝita kaj eblis sukcesplene nuligi la reziduojn.



Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldonikatalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol naŭ jaroj ĝis 163 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skynet.be